

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry, E. de Zilah.
Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la Administracio, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio. Tel.:
01-415615. Pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Membreco de ICNEM
(200 dkr.) inkluzivas la abonon. Vidu la
antaŭlastan kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

Karaktero de la Jubilea-Konferenco en Graz (Ivo Lapenna)	73
"Esperanto por la Afrikanoj" - Historio de Fiaskoj kaj Blufoj (Bernard Golden).....	74
Jean Thierry fariĝis Membro de La Akademio....	78
Esploro kaj Dokumentado (ED) (red.: Prof. D-ro Ivo Lapenna)	79
Lingva Angulo: Danĝera Disrompado de la Lingva Unueco (Ivo Lapenna/Paul Neergaard)...	82
Definitiva Programo de 12-a IK de N.E.M. en Ateno.....	84
Esperanto en Radio.....	86
Leteroj (D-ro T. Tyblewski).....	86
Beletro (trad.: E. Kervers van Tholen).....	87
Pensoj pri Dulingvismo (Vinko Ošlak).....	88
Donacoj por la Jubilea Esperanto-Monumento....	90
Tra la Esperanto-Gazetaro (red.: Jean Thierry) 91	
Lastmomente: Dimisio de la LKK por la Jubilea Kongreso de UEA en Varsovio.....	94
Mallonge (Kopenhaga Horizonte-Grupo).....	95

Frontpaĝa bildo: Antaŭ la Parlamento
de Aŭstrio en Vieno, celo de unu el
la ekskursoj dum la Jubilea Konferenco
1987 en Graz.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
Graz. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 230 ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London, E10 7HL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre, Kopenhago. Pĉk. Kopen-
hago 1 19 06 01. Jarabono: 100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017
Paris. Pĉk. 191707 Z Rennes Jarabono: 100
f.fr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85)
Jarabono: 30 DM

Grekio:

Adamantia Sakellariopoulou, Aghias Paraskevis
30, Ateno 816. Jarabono: 100 d.kr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sarda:
19000 669/2, Vilafranca del Penedès
(Barcelono), Avenida de Barcelono 35.
Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Faklieru Aviv, IL-58410, Holon, D.Elazar 3,
Tel Aviv. Jarabono: 100 d.kr.

Italio:

Enrico Mingo, Via Simone Martini, 22, Isolato
19, I-80128 Napoli. Jarabono: 17000 liroj.

Japanio:

Joŝiki Tacumi, Nakasu 1-2-24-207, Takara-
zuka-si. Jarabono: 100 d.kr. = 2.329 Yen (JPY).
Jugoslavio:

Prof. d-ro Oton Pancer, Voćarsko Naselje 10,
YU-41000 Zagreb. Tekući račun: Zagrebačka
banka 30101-620-16-012106. Jarabono: 1000 din.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm.
Pĉk. 54175-49. Jarabono: 100 d.kr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
I.R. 3015 BC Rotterdam. Pĉk. 333790.
Jarabono: 36 n.gld.

Svedio:

Gösta Persson, Buntmakaregatan 1, S-25248
Helsingborg. Ĝirkonto: 434 1664-3. Jarabono:
100 d.kr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la
Administracio aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis
peranto en tiu lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn nur
por la tuta kalendara jaro.

PLI AKTUALA OL IAM ANTAŬE

HORIZONTO, SENNACIULO, MONATO kaj aliaj demokrataj periodaĵoj konfiskataj en la landoj de la sovetia bloko - Demokrate elektita estraro de Pola Esperanto-Asocio (PEA) forpelita - PEA nun estrata de komisaroj nomumitaj de politikaj aŭtoritatoj - Redakcio de POLA ESPERANTISTO eksigita de politikaj komisaroj

Jen kelkaj el la aspektoj de la nuna situacio antaŭvidita preskaŭ kun ekzakteco de naturaj sciencoj en


HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO

DOKUMENTOJ KAJ MATERIALOJ PRI LA KONTRAŬNEŬTRALECA
POLITIKA KONSPIRO EN UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

DE

IVO LAPENNA

Komitatano kaj estrarano de UEA 1938-1974, ĝenerala sekretario 1954-1964, prezidanto 1964-1974, Honora Membro ĝis la puĉo de 1974, rifuzinto de proponita Honora Prezidanteco de UEA en 1974



DUA KOMPLETIGITA ELDONO

Kopenhago 1977

Broŝurita, formato 20,5 x 14 cm, 152 paĝoj.

Prezo nur 70 danaj kronoj, aŭ 5 anglaj pundoj, aŭ egalvaloro en liberaj valutoj, plus 10% por la ekspedkostoj; rabato de 20% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj kaj 33% ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

NIA CELO NE ESTAS GAJNI

- NIA NURA DEZIRO ESTAS

DISKONIGI LA VERON

Mendebli ĉe "Eldonejo Perspektivo" (Libroservo de N.E.M.), Nørregårdsvej 91, DK-Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk. Kopenhago 9 32 95 95; ĉe bonaj libroservoj kaj ĉe la aŭtoro je la adreso 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Anglio.

LA PLEJ GRAVA SOCI-POLITIKA VERKO DE LA ESPERANTO-LITERATURO

ALIAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA EN ESPERANTO

RETORIKO, la plej legata verko de la postmilita periodo, jam pli ol 6.000 ekz. disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 140 danaj kronoj, 10 anglaj pundoj aŭ egalvaloro; dua eldono, bindita, nur 98 danaj kronoj aŭ 7 anglaj pundoj (restas nur 18 ekz.).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de **RETORIKO**, 152 p., fortike broŝurita, prezo 98 danaj kronoj, 7 anglaj pundoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 70 danaj kronoj, 5 anglaj pundoj aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO: FAKTOJ KAJ ANALIZOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne kompleta sen **HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO** (v. dorsflanke), bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj tema kaj persona indeksoj, prezo 84 ned. guldenoj, 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe "Eldonejo Perspektivo" (Libroservo de N.E.M.), Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio, pĉk. Kopenhago 9 32 95 95 kaj ĉe ĉiuj bonaj libroservoj. Kun la escepto de **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**, la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro je la adreso: 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, HA9 8TF, Anglio, laŭ la prezoj indikitaj en la anglaj pundoj.

AL LA PREZOJ BV. ĈIAM ALDONI 10% POR LA SENDKOSTOJ. ANTICIPAN DANKON PRO VIA MENDO!

* * *

EN PREPARO NOVA VERKO DE

IVO LAPENNA

KRITIKAJ STUDIOJ

DEFENDE DE ESPERANTO

Publikigota okaze de la Jubilea Esperanto-Jaro 1987

Detaloj en baldaŭaj komunikoj

KARAKTERO DE LA JUBILEA-KONFERENCO EN GRAZ



La preparlaboroj por la Jubilea Esperanto-Konferenco (JEK) en Graz bonege progresas. Ĝia definitiva kadra programo povos esti fiksita jam dum la 12-a Internacia Konferenco de N.E.M., okazonta baldaŭ en Ateno. En la nuna stadio sufiĉas mencii - kaj emfazi - kelkajn el ĝiaj plej gravaj trajtoj.

La Jubilea Esperanto-Konferenco ne estas aranĝo de ICNEM, nek de UEA, nek de SAT, nek de kiu ajn alia Esperanto-organizaĵo. JEK estos plene kaj ekskluzive dediĉita al la centjara ekzisto de La Internacia Lingvo, ŭnika socikultura fenomeno en la historio de la homaro, kaj al la rimarkindaj kulturaj valoroj kreitaj en ĝi kaj pere de ĝi. La Konferencon organizas ne nur aktivuloj de ICNEM, sed ankaŭ aktivuloj de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj personoj ekster kiu ajn organizaĵo. Ĝin povos partopreni ĉiu Esperanto-parolanto, tute egale ĉu li estas membro de iu Esperanto-organizaĵo aŭ ne, kaj senkonsidere al siaj religia kredo aŭ koncepto kaj demokrate politika konvinko. Mallonge, JEK estos, se ne nombr, do certe laŭ enhavo tio, kio devis kaj povis esti impona mondkongreso de Esperanto, kiel la subskribinto proponis kaj ICNEM apogis jam ekde 1981.

La saman karakteron havos la nun formiĝanta Internacia Honora Komitato (IHK) de la Jubilea Esperanto-Konferenco. Ĝi konsistos el nombro da sciencistoj parolantaj La Internacian Lingvon, preskaŭ ĉiuj monde konataj en siaj respektivaj fakoj. Kelkaj el ili estas aktivaj en la Esperanto-Movado, sed pluraj troviĝas tute ekster ĝi. Kompleta listo de ĉiuj membroj de IHK kun iliaj sciencaj titoloj aperos en la sekvanta n-ro de *Horizonto*.

La ĉeftemo de la Konferenco estos pritraktita en deko da lekcioj rilatantaj al: loo jaroj de evoluo de la lingvo Esperanto, loo jaroj de la esperantlingvaj originala kaj traduka literaturoj, loo jaroj de Esperanto en la servo de sociaj kaj naturaj sciencoj, loo jaroj de Esperanto kiel lingva instrumento de internacia kompreniĝo kaj esprimo de humaneca internaciismo, ktp., ĉiu kun "loo jaroj" en la titolo. Plej kompetentaj lekciistoj prezentos la temaron, kiu estos efike apogita per granda Esperanto-Ekspozicio aranĝota de Stiria Landa Biblioteko kun la helpo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj la LKK.

La solena inaŭguro de la inspira "La Espero" de Jesper Neergaard estos unu el la grandaj eventoj de la Konferenco. Ankaŭ tiu impona monumento, simbolanta la rolon de Esperanto survoje al harmonia kunvivado de popoloj en libero, estas dediĉita ne al tiu aŭ alia Esperanto-organizaĵo, nek al tiu aŭ alia idea fluo en la Esperanto-Movado, sed al La Internacia Lingvo genie iniciatita de D-ro L.L. Zamenhof.

La bazajn partojn de la programo kompletigos aliaj interesaj eroj: oficialaj akceptoj kun regaloj, bankedo kaj internacia publika balo, vizitoj al la vidindaĵoj de la urbo, ekskursoj ktp., ĉio konforme al la karaktero de la Konferenco. Pri tio kaj pri aliaj planitaj agadoj daŭre aperados informoj en *Horizonto*. Tial estas tre rekomendinde aboni la revuon, se la aliĝintoj kaj aliĝintoj ne jam estas abonantoj.

Pro la nuna situacio en la Esperanto-Movado kaj pro la tute aparta karaktero de la Jubilea Konferenco oni povas atendi multe pli grandan partoprenon, ol komence antaŭvidite. Tamen, oni konsideru, ke Graz ja estas tre alloga, sed ne granda urbego, kaj ke ĝi malfacile povos gastigi pli ol 500-600 konferencanojn. Tial tre frua aliĝo estas esenca por ĉiuj, kiuj intencas partopreni tiun unikan eventon en la Jubilea Jaro. Ju pli baldaŭ, des pli bone ankaŭ por faciligi la sindonan laboron de la organizantoj.

Ivo Lapenna

"ESPERANTO POR LA AFRIKANOJ" - HISTORIO DE FIASKOJ KAJ BLUFOJ

1. La granda problemo

Antaŭ iom pli ol kvaronjarcento okazis verŝajne la unua seminario pri la temo "Esperanto en la Tria Mondo". Dum la jarŝanĝiĝo 1959/1960 42 gejunuloj partoprenis en seminario pri aziaj kaj afrikaj problemoj sub la aŭspicioj de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). (1). Unu el la celoj de la diskutado estis trovi manieron akceli la uzadon de la Internacia Lingvo en la ĉiutaga vivo kaj en internaciaj rilatoj en la koncernaj regionoj. La geseminarianoj informiĝis, ke Esperanto multege helpus pli rapidan evoluon de landoj de la Tria Mondo sed (oni ruĝkrajone substreku la sekvajn vortojn) "estas nur problemoj kiel enkonduki ĝin". Tiu simpla sed baza demando hantis ĉiun seminarion kaj diskuttrondon ĝis nun okupiĝantan pri la disvastigo de Esperanto en ankoraŭ virgaj teritorioj de la mondo. La problemoj hodiaŭ estas la sama, kiun oni pridiskutis en la junulara seminario de GEJ antaŭ dudek kvin jaroj, sed nova generacio okupiĝas pri ĝi. Ĉu ankaŭ la proponoj por solvi la problemon estos similaj al tiuj de la pasinteco, aŭ ĉu okazos trarompo de novaj, originalaj ideoj?

2. Malbona planado rezultigas sukcesajn fiaskojn

Ni ekzamenu la agadon por doni Esperanton al Afriko laŭ la vidpunkto de la propagandistoj kaj planantoj, kiuj estas komisiitaj de la "oficiala" Universala Esperanto-Asocio (UEA) aŭ alia organizaĵo, aŭ kiuj agas tute sendepende kiel unuopuloj. Karakterizas iliajn projektojn kaj kampanjojn du ĉefaj difektoj: (a) ili estas naive aŭ diletantece konceptitaj, kaj pro tio neefektiveblaj, kaj (b) ili estas sporadaj, mallongdaŭraj kaj malkunordigitaj kun la rezulto, ke iliaj efikoj estas efemeraj. Ekzemple, antaŭ kelkaj jaroj estis vaste kaj laŭte distrumpetitaj la prelegvojaĝoj de Tibor Sekelj kaj Tamiko Kaŭakami, kiuj, ludante la rolon de verdaj misiistoj, migradis en Afriko por transdoni la mesaĝon de Esperanto. Kiam la du propagandistoj forvojaĝis, interesiĝo pri Esperanto en Afriko malaperis same rapide kiel iliaj ombroj.

Kiuj ne estis pretaj sekvi la paŝojn de Sekelj kaj Kaŭakami, provis kontakti afrikanojn en la propra lando. Tiel proponis la membroj de la seminario priskribita ĉi-supre.

"La esperantistoj en Eŭropo povas mem helpi al tiuj klopodoj per instruado de Esperanto al eksterlandaj studentoj. Kiam ili foriros hejmen al Afrikaj kaj Aziaj landoj, ili fariĝos disvastigantoj de la Internacia Lingvo inter la samlandanoj."

La afero ne estas tiel facile realigebla, kiel naive proponis la eŭropaj gejunuloj antaŭ du kaj duona jardekoj. En 1981 Internacia Kultura Servo en Zagrebo "nespektakle kaj realisme" ekagis por kolekti monon kun la celo instrui Esperanton al afrikanoj studentaj en Eŭropo. Estis starigita fonduso kun la nomo "Esperanto en Afrikon", kaj por membriĝi oni devis pruntedoni aŭ donaci 800 guldenojn. Kiel ĉiuj malplenaj bobeloj, la fondusplano krevis, antaŭ ol manifestiĝis iu ajn pozitiva efiko de la programo.

3. La afrika politiko de UEA

La aktuala afrika politiko de UEA kun la slogano "Esperanto por la afrikanoj" kristaliĝis en la jaro 1980 dum la kunsido pri Regiona Agado de UEA en la Tria Mondo kadre de la Universala Kongreso en Stokholmo. Kiel oficiala vidpunkto de UEA estas la sekva eldiro de Simo Milojević, kiam li estis la redaktoro de

Esperanto en 1983 (2).

"Estas granda iluzio kredi, ke Esperanto povas atingi sian finan celon - la ĝeneralan akceptigon kiel internacia komunikilo - sen ke ni ankaŭ en Afriko atingu minimume tian disvastiĝon de la lingvo, kian ĝi spertas en la aliaj partoj de la mondo. Oni ne plu povas - feliĉe! - trudi al Afriko decidojn de ekstere. Afriko nun mem pensas kaj decidas, ĝi do devas agi laŭ siaj propraj sperto kaj konvinko. Ni tial ŝuldas ankoraŭ Esperanton al Afriko kaj ni devas doni prioritatan atenton al la disvolviĝo de la Esperanto-movado tie." (p. 102).

4. Pli frua planado

Eĉ pli frue kelkaj funkciuloj de UEA komencis skizi projektojn. Jam en 1974 Renato Corsetti (3) prezentis sian planon por la esperantistigo de Afriko je mallonga templimo (dum 3-4 jaroj) kaj je pli longa templimo (post 10-15 jaroj). Tiam, laŭ la revo de Corsetti, oni devas havi en Afriko

"movadon por la Internacia Lingvo, kiu ne estas simpla paŭsaĵo de la Eŭropa, sed movado kun originalaj trajtoj, kaj ĉefe movado engaĝita en la progreso de la landoj en kiuj ĝi agas." (p. 205).

Tiu transformiĝo de la afrikaj esperantistoj devis okazi inter la jaroj 1984-1989. Ni nun estas en la mezo de tiu kriza periodo. Kiel aspektas la Esperanto-movado en Afriko kun nigrula vizaĝo? Ĝuste dum la 1980-aj jaroj inundis la gazetaron de Esperantujo multaj artikoloj, fanfaronantaj pri grandaj paŝoj antaŭen (kaj flustrantaj pri kelkaj glitoj malantaŭen). Temas pri la starigo de kursoj kaj la organizado de kluboj kaj landaj organizaĵoj (kelkaj nur surpaperaj). Responde al unu el miaj kritikaj artikoloj (4), Hans Bakker, tiam membro de la grupo en UEA okupiĝanta pri Regiona Agado en Afriko, en letero al la redakcio provis defendi sin. Tamen, li ne povis nei, ke la graveco de "komencaj sukcesetoj" estas supertaksataj de li kaj de la revuoj, kiuj publikigis raportojn pri ili.

Ankoraŭ ne aperis en la gazetaro la grava informo, kiun ĉiuj atendas: la formiĝo en Afriko de indiĝena Esperanto-movado kun siaj propraj trajtoj, kiu, en la vortoj de Corsetti, "ne devos daŭre direkti siajn rigardojn al Rotterdamo, nek priatenti la kurzon de la guldono."

5. La emfazo pri kvanto anstataŭ kvalito

Alia aspekto de la afrika politiko de UEA ŝajnas emfazi pli la geografian distribuon de esperantistoj en Afriko ol la kvaliton de ilia esperantisteco. Ĉi-rilate kvalito ampleksas la nivelon de lingvoscio kaj la sincerecon kaj dediĉitecon de la esperantisto. Laŭ Gilles Wallez (5) la plej grava kriterio por juĝi la internaciecon de lingvo ne estas la nombro de parolantoj sed la geografia disvasteco de la parolantoj. Kun rilato al Afriko li skribas:

"Tio devas esti unu celo, pli bajdaŭ atingebla, ol ni povas grandkvante altigi la nombron de la parolantoj de Esperanto." (p. 103).

Tiu vidpunkto havas eĥon en artikolo de Corsetti (6).

"... ni, t.e. la homoj, kiuj okupiĝas pri kontaktoj kun esperantistoj en Azio, Afriko kaj Sudameriko en la kadro de la Komisiono pri Regiona Agado de UEA, laboras, por ke estu almenaŭ dek parolantoj en kiel eble plej multe da landoj en tiuj kontinentoj."

Tio estas sensencaĵo! Kial Corsetti elektis la arbitran nombron dek? Estas pluroble dek esperantistoj en ĉiuj eŭropaj landoj, sed kion tio signifas?

Estas ankoraŭ unu atestaĵo montranta la obsedon de la afrikaj politikistoj de UEA ŝveligi statistikojn pri la nombro de landoj en Afriko, kie troviĝas

esperantistoj. Sur p. 15 de la *Jarlibro* de UEA por 1983 estas tabelo titolita "Laŭkontinenta analizo", kiu donas informojn pri landa agado. Estas indikite, ke en Afriko agado okazis en 47 landoj; tio estas pli da landoj ol en iu ajn alia kontinento! La kompilintoj de la tabelo manipulis la rezultojn per enkomputerigo de adresoj de ĉiu afrika interesito, entute 674. Kion signifas 674 nomoj kaj adresoj? La vasta plejmulto ne scias Esperanton; ili nur skribis por peti informojn. En la apudaj kolumnoj estas pli sobraj donitaĵoj: 54 individuaj kaj 65 aligitaj membroj de UEA en 19 landoj, en kiu estas nur 2 landaj asocioj. La mapo sur paĝoj 16-17 de la sama *Jarlibro* pli elokvente akcentas, ke Afriko ne estas nigra sed blanka kontinento, t.e. kun multaj landoj, en kiuj mankas membroj. La lasta linio de la klarigo pri la statistika tabelo tekstas: "Tio substrekas la intensan laboron de niaj komisiitoj pri Afriko: H. Bakker, N. Vessella, E. Symoens kaj K. Braet." Sed kion ili faris? - ili nur kolektis adresojn!

6. Blufado en la gazetaro

La sekvaj ekzemploj de artikol-titoloj ĉerpitaj el *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto* donas ideon de la troiga entuziasmo de senrespondecaj propagandistoj kaj ĵurnalistoj rilate agadojn en Afriko.

"UEA survoje al universaligo" - "Pli ol 200 informpetoj el Afriko"

"Ankaŭ en Ruando ekviglas la Movado" - "Movada kerno en la nigerio Ondo"

"Kursosvarmo en Zairio".

Legante la artikolojn, oni informiĝas, ke temas pri klubo tie, rondo ie, "naskiĝanta grupo" aliloke kaj kursoj ĉie. Oni parolas pri "dekoj, eĉ centoj" da interesuloj, sed la plej forta indiĝena landa Esperanto-movado en Afriko, tiu de Zairo, havas nur 25 membrojn! Ian Tarrant (7) raportis en 1982 pri reklamkampanjo de UEA en Kenjo per anoncoj en ŝahila ĵurnalo, ofertantaj la ŝahilan tradukon de la propaganda bruŝuro *Por la defendo de afrikaj kulturoj*. Ankaŭ aliaj publikigaĵoj estis senditaj al informpetantoj, sed nun, kvar jarojn poste, estas nenio pozitivaj rezultoj. Unu el la propagandaj artikoloj informas, ke en Kenjo ekzistas "grupetoj lernintaj kaj lernantaj" Esperanton, sed ne estas dirite, ĉu la lernintoj estas kursfinintaj aŭ kursforlasintoj. La *Jarlibro* de 1985 registras nek delegiton nek landan organizaĵon en Kenjo, kaj laŭ la statistiko pri la membraro de UEA, en Kenjo estis nur unu individua membro en 1983 kaj du en 1984 (8). Tio estas ok malpli ol la dek esperantistoj, kiujn postulas Corsetti. Kaj estas ĝuste li, kiu malkaŝis al mi la motivon de la troigoj kaj blufado en la raportoj senditaj al la gazetaro.

"... mi petas vin ensalti en la vestojn de propagandisto. Ioma blufado aŭ minimume silentado pri malpozitivaj aspektoj estas neevitebla."

Mi jam komentis pri tiu makiavelisma sinteno en la revu-artikolo, kiu incitis Hans Bakker (4).

7. La konspiro de silento

Homoj, kies grandiozaj planoj kaj belaj revoj fiaskis, ne volonte parolas pri ili kaj eĉ malpli kapablas toleri kritikon pri troigoj kaj blufado, kiuj troviĝas en iliaj propraj propagandaĵoj. Du ekzemploj ilustros tiun tendencon kaŝi aŭ nei misojn kaj mankojn.

Mi jam menciis la propagandan bruŝuron *Por la defendo de afrikaj kulturoj* verkitan de Corsetti. En 1975 mi ricevis de li la projektitan tekston en Esperanto. Post atenta legado, mi sendis al la aŭtoro mian detalan kaj drastan kritikon pri la tuta verko. Vane mi faris tion, ĉar la neŝanĝita teksto estis tradukita, unue en la anglan kaj francan kaj poste en la ŝahilan lingvojn, kaj ili estis eldonitaj de UEA/TEJO (9). Post la publikigo de mia kritika analizo en

La Kancerkliniko (LKK) (10), Corsetti verŝajne protestis. La redakcio de LKK donis al li eblon repliki sur la paĝoj de la revuo, sed Corsetti decidis fuĝi for de la batalkampoj. Per jenaj feblaj argumentoj li provas eviti respondecon pri sia mallerta kunmetado de tiu t.n. informilo. (11).

"Tiuĵ, kiuj volas kontroli la kvaliton de tiu broŝuro, bonvolu peti ekzempleron de ĝi ĉe la Centra Oficejo de UEA.

Kiam temas pri la neceso disvastigi Esperanton en ĉiuj mondpartoj, inkluzive de Afriko, mi ne opinias ke mi devas defendi tiun starpunkton antaŭ inteligentaj esperantistoj."

Ankaŭ pli frue Corsetti kaŝis la veron pri la koncerna broŝuro. En 1979 mi sendis informpeton al li por ekscii, kiom da ekzempleroj de la propagandilo estis senditaj al afrikanoj. Li respondis, ke

"ne eblas statistigi pri la efikeco de tiuj broŝuroj, ĉar oni ne laŭplane dissendis grandan nombron da ili."

Jen ankoraŭ unu ekzemplo de la neevitebla "silentado pri malpozitivaj aspektoj" de la afrika politiko de UEA.

La dua ekzemplo de la konspiro de silento rilatas al la elspezoj de UEA en Afriko. En la estrara raporto de UEA por 1984 (12) troviĝas listo de "komencaj sukcesetoj" en kelkaj afrikaj landoj kaj sekvas jena klarigo.

"UEA investis, pere de la Fondaĵo Azio-Afriko, en la pasinta jaro pli ol 30.000 guldenojn en ĉi tiun agadon. Tie kaj jene en la movada gazetaro aperas negativaj opinioj pri la nuna skalo de la regiona agado de UEA. Evidentas, ke tiuj homoj ne scias pri kio ili parolas." (p. 113).

En aŭgusto 1985 mi sendis leteron al Grégoire Maertens, la prezidanto de UEA kaj respondeculo pri financoj, kaj petis lin informi min detale pri la investo de la 30.000 guldenoj kaj pri la pozitivaj kaj daŭraj rezultoj de tiu elspezo. Manke de respondo, mi skribis duan leteron en novembro. Ankaŭ tiun leteron Maertens rifuzis respondi. En januaro 1986 mi komencis cirkuligi nefermitan leteron al Maertens, titolitan "Kio okazis al la 30.000 guldenoj en Afriko?" Mi ne scias, ĉu ĝi efikos por neniigi la konspiron de silento. Ankoraŭ ne venis reagoj, sed mi esperas, ke mia klopodo atentigos la afrikan premgrupon en UEA, ke ne havas sencon strutpolitike prisilenti fiaskojn kaj per bluoj plenblovi statistikojn pri "komencaj sukcesetoj".

Bernard Golden

Notoj

- (1) Tone Rogelj. Aziaj kaj afrikaj problemoj; seminario de GEJ. *Esperanto*. 1960 marto; 3:52.
- (2) Simo Milojević. Por doni sencon al nia propra esperantisteco. *Esperanto*. 1983 junio; 6: 101-102.
- (3) Renato Corsetti. La neplugita kampo. *Esperanto*. 1974 decembro; 12: 203-205.
- (4) Bernard Golden. La afrika korpo pleniĝas denove rezulte de makiavelisma propagando. *Pola Esperantisto*. 1984; 4: 11-14.
- (5) Gilles Wallez. Kio okazas en Ebura bordo? *Esperanto*. 1983 junio; 6: 103-104.
- (6) Renato Corsetti. Dek parolantoj kontraŭ unu ministra deklaro. *Esperanto*. 1983 junio; 6: 104.
- (7) Ian Tarrant. Ili ne bezonas la kvinan lingvon. *Esperanto*. 1982 marto; 3: 45-46.
- (8) La membraro de UEA en 1983. *Esperanto*. 1984 februaro; 2: 39. La membraro de UEA en 1984. *Esperanto*. 1985 februaro; 2: 39.
- (9) *In defense of African cultures*. 1977. } UEA/TEJO
 Pour la défense des cultures africaines. 1977. } Rotterdam
 Kwa kulinda tamaduni za Afrika. 1979. }
- (10) Bernard Golden. Esperanta mispropagando por Afriko. *La Kancerkliniko*. 1985; 33: 16-17.
- (11) Renato Corsetti. Raro Leteraro. *La Kancerkliniko*. 1985; 35: 19.
- (12) Raporto de la Estraro pri la agado de UEA dum 1984. *Esperanto*. 1985 junio; 6: 103-118.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro IVO LAPENNA

77 Grasmere Avenue, Wembley, HA9 8TF, Middlesex, Britio.

92. LA PUĈO EN POLA ESPERANTO-ASOCIO (PEA)

92.1 Dokumentoj

La dokumenta materialo publikigita en *Horizonto*, n-ro 1/86 ("Oni ne Diru, ke ili ne sciis" de W. Zelazny, "Simbolo pri la Jubilea Jaro Malpermesita en Pollando"); n-ro 2/86 ("Jubilea Kongreso Organizata de Politikaj Komisaroj" de I.L.; "Puĉo en Pola Esperanto-Asocio" de W. Zelazny, "Forpelo de la Redakta Komitato de *Pola Esperantisto*"); n-ro 3/83 ("Publika Letero de SAT al ..." kaj "Membro de HPK de UEA pri la UK de UEA en Varsovio") estas nur parto de la dokumentaro pri la puĉo en Pola Esperanto-Asocio (PEA). Aliaj gravaj dokumentoj estas:

(i) Esperanto-traduko de la Decido de la 17-a de oktobro 1985, per kiu la Departemento pri Sociaj kaj Administraj Aferoj de la Metropolo Varsovio likvidis la ĉefan Konsilantaron kaj la Ĉefan Estraron de PEA, kaj nomumis "Provizoran Estraron", konsistantan el naŭ "civitanoj" (komisaroj) kun iliaj plenaj nomoj. La dokumento estas publikigi en *La Gazeto*, n-ro 3/86.

(ii) Artikolo de W. Zelazny, antaŭe demokrate elektita membro kun funkcio de "prokuroro" en la Ĉefa Estraro de PEA, sub titolo "Kaj Rapide Kreskas la Afero", en kiu li kompetente, kun plena kono de la faktoj, pritraktas la Decidon pri la likvido kaj donas pliajn precizajn informojn pri la fono de la puĉo. La artikolo aperis en *La Gazeto*, n-ro 3/86.

(iii) Fotokopiaĵoj de tri dokumentoj: la invito de PEA de 27.07.83 al SAT (kaj aliaj) okazigi sian jubilean kongreson en Pollando; la urĝigan leteron de SAT de 17.10.85 al PEA; la respondo de PEA de 24.01.86, per kiu la komisaroj revokas la inviton de 1983 kaj tiel malebligas al SAT okazigi sian jubilean kongreson en Pollando. La fotoreproduktaĵoj estas publikigitaj en *Sennaciulo* n-ro 4 de aprilo 1986. Oni rimarkos, ke sur la leterpapiro de PEA estas forstrekitaj la vortoj "Ĉefa Estraro".

Estas notinde, ke en *Esperanto*, oficiala organo de UEA, ĝis la mezo de majo 1986 aperis nenio, eĉ ne aludeto pri la puĉo, kvankam, evidente, la Estraro de UEA ne povis ne scii pri ĝi, ĉar ĝi okazis la 17-an de oktobro 1985. Verŝajne, post plurmonata cerbumado kiel misprezente elturniĝi, la organo de UEA publikigos ion en la aprila aŭ iu posta n-ro.

Por kompletigi la bildon ankoraŭ io:

La ĉefa organizinto de la puĉo en PEA estis Andrzej Grzebowski, kiu dum la elektoj de la estraro de PEA en 1984 ne estis reelektita (*La Gazeto*, n-ro 3/86, p. 6), sed tamen restis komitatano de UEA (*Jarlibro* 1985, p. 10). La sama A. Grzebowski kaj du el la nun nomumitaj komisaroj - M. Dobrzynski kaj S. Świstak) - estis komitatanoj de UEA en 1974 (*Jarlibro* - 1974, p-oj 6, 7, 9). Ili kune kun la aliaj UEA-komitatanoj el la blokaj landoj kaj la "kunvojaĝantoj", partoprenis en la hamburga partipolitika puĉo en UEA. La identeco kaj kontinueco estas pli ol klaraj.

Oni nepre atentu ankaŭ al pluraj eroj en la rubriko "Tra la Esperanto-Gazetaro" en tiu ĉi n-ro, precipe al tiuj rilatantaj al *der esperantist*, *La Pacaktivulo*, *Internaciisto*, *Sennaciulo* kaj *SAT-Amikaro*.

92.2 Ĝenerala Komento

La puĉo en PEA kaj la malpermeso al SAT kongresi en Pollando estas ŝokaj por ĉiuj kun la escepto de la ĝisostaj sovetiistoj kaj de la komplete enŝaltitaj kunvojaĝantoj, sed certe ne surprizaj por ni kaj por tiuj, kiuj atente legis la verkon *Hamburgo en Retrospektivo* kaj la dokumentajn materialojn publikigitajn en tiu ĉi rubriko. La partipolitika konspiro en UEA komenciĝis en la fruaj sepdekaj rezulte de la ĝenerala instrukcio de Moskvo ekkaperi la plej gravajn neregistarajn organizaĵojn en konsultaj rilatoj kun UN kaj/aŭ Unesko, kaj transformi ilin en la t.n. "transmisiilojn" de la sovetia monda strategio. Malgraŭ mia admono en la jam historia *APRILA ARTIKOLO* (*Esperanto*, n-ro 4/74) pri la danĝero, kaj malgraŭ la fakto, ke en la elektoj de la Komitatanoj B en 1974 mi ricevis plebiscitan apogon de la individua membraro, la sovetiismaj komplotintoj kun la helpo de la kunvojaĝantoj (kaj kelkaj ambiciuloj) povis kontraŭstatute manipuli la Komitaton de UEA kaj la puĉo sukcesis. La plua, kreskanta politikigado de UEA estas nenio alia ol laŭvicaj sekvoj de la hamburga puĉo. Ili estus eĉ pli katastrofaj, se la ekzisto de *Horizonto* kun tiu ĉi rubriko ne malebligus eĉ pli fatalajn mispaŝojn. Nun necesas iom atendi por vidi kio okazos: ĉu eĉ post tiuj ŝoke krudaj eventoj en PEA la Estraro de UEA plu obstine restos ĉe sia decido "jubilee" kongresi en Varsovio, aŭ ĝi aŭdacos proponi al la Komitato en Pekino elekti alian urbon en iu demokrata lando; ĉu fakte la Estraroj de UEA kaj Tejo kuraĝos nuligi la kongreson de TEJO en Israelo, kiel postulas "la 18-a konsultiĝo de lo Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj" (v. la eron *der esperantist* en "Tra la Esperanto-Gazetaro" en tiu ĉi n-ro); ĉu, fine, inter la komitatanoj de UEA, Honoraj Membroj de UEA, Membroj de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj landaj asocioj aliĝintaj al UEA troviĝos almenaŭ kelkaj, kiuj publike protestos pro tiuj pliaj krudaj, nun eĉ tute apertaj, intervenoj de ekstermovadaj partipolitikaj fortoj? Ne nur protesti, sed ankaŭ tiri la konsekvencojn, se la protestoj restos senrezultaj.

92.3 Aparte pri PEA

Kiel pruvite jam plurfoje, la decidaj organoj de la Esperanto-organizaĵoj en la blokaj landoj estas plene sub kontrolo de siaj respektivaj komunistaj-sovetiistaj partioj kaj devas propagandi la sovetian eksterlandan politikon. Ekde 1974 ili tion libere faras en la sino mem de UEA sen kia ajn rezisto fare de la Estraro kaj Komitato de la Asocio aŭ de la aliĝintaj landaj asocioj en demokrataj landoj. Tiel estis ankaŭ en PEA. Sed dum la ioma liberaliĝo en la periodo de "solidarnoŝĉ" ankaŭ la membroj de PEA povis iom libere ekspiri kaj demokrate elekti la Ĉefan Konsilantaron kaj la Ĉefan Estraron de sia Asocio. La likvido de tiuj demokrate elektitaj organoj kaj la nomumo de komisaroj signifas tutsimple revenon al la stato antaŭ "solidarnoŝĉ" kaj egalas al la situacio de la aliaj Esperanto-organizaĵoj en la landoj de la sovetia bloko.

Fakte, do, nenio nova kaj nenio surpriza por la informitoj. Kio vere kaŭzis la ŝokan surprizon en la pli vastaj tavoloj de la neinformita esperantistaro, estis la krudeco de la puĉo: per dekreto de la ŝtata-partia aŭtoritato. Ĝuste tiu krudeco espereble malfermos la okulojn de tiuj, kiuj ĝis nun tenis ilin fermitaj. Ankaŭ en la Komitato de UEA. Kelkajn malsanojn oni kuracas per ŝokoj!

En la nuna situacio UEA devus ne nur rezigni pri sia jubilea kongreso en Varsovio, sed ankaŭ eksigi PEA el UEA konforme al Art. 13 de sia propra Statuto, ĉar, evidente, PEA ne estas "asocio laŭorde organizita", nek ĝi estas "vaste malfermita al la civitanoj de sia lando". Sed, kompreneble, la nuna Komitato de UEA, regata de sovetiismaj fortoj, certe ne faros tion.

92.4 Kio Verŝajne Okazos?

Jen kio: Per sia postulo, ke la kongreso de TEJO ne okazu en Israelo, "la lo Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj" agis plene konforme al sovetia

PRI "KOMUNUMO" KAJ "NACIARO"

DANĜERA DISROMPADO DE LA LINGVA UNUECO

Letero de la Prezidanto de IEAJ al la Prezidanto de UEA

Prof. D-ro Ivo Lapenna, prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) kaj membro de la Akademio de Esperanto, sendis al S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, la 31-an de januaro 1986 jenan leteron:

"Estimata Prezidanto,

La organoj de UEA jam kelkan tempon uzas la terminon "Komunumo" kaj derivaĵojn por EEK. Mi legis, ke nun ili uzas "Unuiĝinta Naciaro" por UNO. Kiel prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) mi esprimas mian fortan bedaŭron pro tiu danĝera rompado de la lingva unueco sur la kampo de internacia juro kaj internaciaj rilatoj. Eĉ se la du jam ekde la fruaj kvindekaj jaroj establitaj terminoj - "Komunumo" kaj "Unuiĝintaj" - estus malpli taŭgaj ol "Komunumo" (laŭ MONATO eĉ "Komuno"! kaj "Naciaro", tamen, same kiel en aliaj lingvoj, ili devus esti konservitaj pro la graveco de la lingva unueco. Sed, fakte, la nun enkondukataj novaj terminoj estas maltaŭgaj kaj konfuzaj. "Komunumo" estas - aldone al aliaj sencoj - baza teritoria-administra unuo, dum "naciaro" estas multe pli kohera ol "nacioj" (komparu ŝafaro-ŝafoj, homaro-homoj, ktp.). Se UEA tiel daŭrigos, baldaŭ iu venos al la ideo ŝanĝi ankaŭ aliajn jam delonge establitajn terminojn, ekz. "Usono" anstataŭ "Usono", en kiu okazo la pravigo almenaŭ povus esti, ke temas pri Unuiĝintaj Ŝtatoj (kaj ne Ŝtatoj) de Nordameriko!

Ĉar mi legis, ke "UEA decidis ...", mi fakte volus scii kiu en UEA faras tiajn decidojn, katastrofajn por la lingva unueco. Ĉu la estraro, aŭ la komitato, aŭ la redaktoro de ESPERANTO, aŭ la redaktoro de UN KAJ NI, en kiu troviĝas tre multaj ankaŭ alispecaj lingvaj eraroj, inkluzive de elementaj gramatikaj.

Mi sendas kopiojn de tiu ĉi letero al Prof. D-ro Paul Neergaard, membro de la PK de UEA, kaj al Prof. J. Régulo Pérez, HM de UEA, ambaŭ membroj de la Akademio, kun la peto, ke ankaŭ ili esprimu al vi siajn opiniojn pri tiu grava demando.

Kun estimo kaj esperantistaj salutoj,

Ivo Lapenna"

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

FONDAĴO IVO LAPENNA

Stato la 1-an de junio 1986 17.387,78 dkr.



12-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

26. Julio - 2. Aŭgusto 1986

Ateno (Grekio)

Konstanta adreso:

Adamantia Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno 816, Grekio

ĈEFTEMO: PACO KAJ LIBERECO

DEFINITIVA PROGRAMO

Vendredon, la 25-an je la 11-a h.: Gazetara Konferenco.

Sabaton, la 26-an de la 9-a ĝis la 11-a h.: Disdonado de Dokumentoj.

Je la 17-a h.: Kunsido de la PK de ICNEM, redakcio/administracio de *Horizonto* kaj LKK (laŭ aparta tagordo).

Je la 21-a h.: Interkona Vespere.

Dimanĉon, la 27-an je la 9-a h.: Inaŭguro kun jena tagordo:

1. Bonvenigaj vortoj de la prezidanto de LKK kaj de la aŭtoritatoj,
2. Salutvortoj de la delegitoj de la reprezentitaj landoj,
3. Bonveniga parolado de D-ro Eugène de Zilah al la membroj de MFKA,
4. Elekto de la Konferenca Prezidantaro,
5. Inaŭgura parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna pri "Kial Paco en Libereco?".

Je la 16-a h.: Filmo pri Ateno.

Je la 17-a h.: Daŭrigo de la kunsido de la PK de ICNEM, *Horizonto* kaj LKK.

Je la 20, 15 h.: Teatra prezento de folkloraj dancoj.

Lundon, la 28-an de la 9-a ĝis la 13-a h.: Prelegoj de

Sokrates Sakellaropoulos: "Libereco, Paco kaj Humanismo en la Antikva Greka Filozofio"

Jean Thierry: "Historia Formiĝo kaj Aktuala Pravigo de Libereco"

D-ro Eugène de Zilah: "Konceptaj Rilatoj Inter Paco kaj Libereco"

Je la 16-a h.: Filmo pri Grekio.

Je la 17-a h.: Ĉefkunveno de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) (laŭ aparta tagordo).

Vespere: Koncerto en la Teatro de Herodo de Atiko (ĉe Akropolo).

Mardon, la 29-an de la 9-a ĝis la 13-a h.: Prelegoj de:

Walter Zelazny: "Paco - Esperanto - Libereco"

Ambasadoro Ralph Harry: "Juraj Rimedoj por Paca Solvado de Internaciaj Disputoj" (legota de D-ro Klaus Perko)

Prof. D-ro Ivo Lapenna: "Politika kaj Jura Aspektoj de la Sovetia Koncepto de Paca Kunekzistado"

Noto pri la prelegoj: Daŭro 40-45 min.: mallonga diskuto post ĉiu prelego; 15-minuta paŭzo je la 11-a h.

Je la 16-a h.: Ĝenerala Kunveno de la Konferenco kun jena tagordo:

1. Debato pri la esencaj punktoj de la ses prelegoj,
2. Sugestoj por la Konferenca Rezolucio kaj elekto de Rezolucia Komisiono,

3. Stato de la preparlaboroj por la Jubilea Jaro (raportoj de Prof. D-ro I. Lapenna kaj D-ro K. Perko), diskuto, sugestoj por kompletigo de la Provizora Programo,
4. Diversaĵoj.

Noto: La diskuton kaj voĉdonadon rajtas partopreni ĉiuj konferencanoj. La decidoj havas karakteron de rekomendoj al ICNEM.

Je la 19-a h.: "Omaĝe al la Konferenco" (surpriza programero zorge de la LKK).

Je la 21-a h.: "Eĥo kaj Lumo" apud Akropolo.

Merkredon, la 30-an je la 9-a h.: Kunsido de MFKA (laŭ aparta tagordo).

Je la 11-a h.: Vizito al Akropolo kaj vidindaĵoj.

Je la 16-a h.: Ĉefkunveno de ICNEM kun jena tagordo:

1. Malfermo, 2. Raporto de la sekretariino pri la agado de ICNEM en 1985/86,
3. Raporto de la kasisto, 4. Raportoj de la prezidanto de ICNEM kaj prezidanto de la LKK-Graz pri la preparlaboroj por la Jubilea Jaro, 5. Senŝarĝigo de la Plenuma Komitato, 6. Eventualaj ŝanĝoj en la konsisto de la PK, 7. Kotizoj kaj buĝeto por 1987, 8. *Horizonto* (redakcio, administracio, gvidlinio, financoj), 9. Jubilea Esperanto-Jaro (precipe kunlaborado kun aliaj Esperanto-organizaĵoj, publikaĵoj kaj informado), 10. Jubilea Esperanto-Konferenco: fikso de la definitiva baza programo (precipe prelegoj/lekcioj, ekspozicio, inaŭguro de la monumento "La Espero", informado, ĝemelurboj de Graz, Internacia Honora Komitato), 11. Loko de la 13-a IK de N.E.M. en 1988, 12. Eventuale aliaj aferoj laŭ proponoj de la membroj, komunikotaj al la prezidanto plej malfrue la tagen antaŭ la ĉefkunveno.

Noto: Voĉdonan rajton havas nur la membroj de ICNEM konforme al la Statuto.

Je la 20-a h.: Partopreno en la Festo de Vino.

Jaŭdon, la 31-an je la 9-a h.: Kunveno de *Simpozio* (laŭ aparta tagordo).

Je la 11-a h.: Akcepto en la Urbodomo.

Je la 16-a h.: Ĉefkunveno de ICNEM (daŭrigo laŭ la supra tagordo).

Vespere: Bankedo kun balo (preciza tempo en la dokumentaro).

la 1-an: Tuttaga ekskurso al Korinto-Mikeno-Nafplio kaj Epidaŭro, vespere teatraĵo en la subĉiela antikva teatro de Epidaŭro (precizaj noroj de la forveturo kaj reveturo en la dokumentaro).

la 2-an je la 11-a h.: Fermo de la Konferenco kun jena tagordo:

1. Malfermo,
2. Resumo de la decidoj kaj rekomendoj,
3. Konferenca Rezolucio,
4. Omaĝe al la ĉefurbo de la Eŭropa Civilizacio kaj Danke al la LKK,
5. Fermo.

Posttagmeze: Libera.

la 3-an: Tuttaga ekskurso al apudaj insuloj (precizaj horoj de la forveturo kaj reveno en la dokumentaro).

la 4-an: Ekskurso al Kreto (forflugo lundon matene, reveno jaŭdon vespere; aparta programo; nur por la aliĝintoj al tiu ekskurso).

GRAVA ATENTIGO: La konferencanoj, kiuj ne estas membroj de ICNEM, IEAJ, MFKA, estas bonvenaj en la kunvenoj de tiuj organizaĵoj.

AL ĈIUJ TUTKORAN BONVENON EN ATENO!

NIA 12-a: VARIA PROGRAMO - UNUARANGAJ PRELEGOJ - KULTURO KAJ DISTRO - KORECO

Se vi ankoraŭ ne aliĝis, vi povas tion fari nun, sen plua prokrasto. Aliĝojn kaj pagojn akceptas la LKK je la konstanta adreso: S-ino Adamantia Sakellaropoulou, Aghias Paraskevis 30, Ateno 816, Grekio.

Esperanto en Radio

HORARO

de la ĉiudimanĉaj Esperanto-disaŭdigoj de la VIENA RADIO (ORF) sur mallongaj ondoj, valida de la 4-a de majo ĝis la 2-a de novembro 1986:

Matene: 5,40 - 5,42 (laŭ Greenwich-tempo!)

5 945 kHz (49 m) por sud-orienta Eŭropo
6 000 kHz (49 m) por Eŭropo kaj norda Afriko
6 155 kHz (49 m) por Eŭropo kaj norda Afriko
9 755 kHz (31 m) por okcidenta Nord-Ameriko
11 830 kHz (25 m) por la Proksima Oriento

Ripeto: 9,45 - 9,57 (laŭ Greenwich-tempo!)

6 000 kHz (49 m) por Eŭropo kaj norda Afriko
6 155 kHz (49 m) por Eŭropo kaj norda Afriko
11 915 kHz (25 m) por norda Eŭropo

Atentu, ke al tiuj indikoj laŭ Greenwich-tempo vi alkalkulu la nombron da horoj, kiun postulas via tempa zono kaj la eventuala (en via lando enkondukita) "somera tempo"!!! En mezeŭropa lando, vintra tempo: 6,40 - 6,52 kaj 10,45 - 10,57, somera tempo: 7,40 - 7,52 kaj 11,45 - 11,57.

Esperanto-Redakcio
de Aŭstria Radio Internacia
(ORF),
A-1136 Vieno, Aŭstrio.

Leteroj

06.05.86

"Estimata Redakcio,

En numeroj 62-a kaj 63-a de *Horizonto* mi trovis la tekstojn, kiuj ne permesos al la esperantistaro konservi dubojn pri la karaktero de la lastperiodaj ŝanĝoj en pola Esperanto-organizaĵo. Mi deziras elkore danki pro via kontribuo al objektivigo de la informoj. Aparte mi dankas al vi pro la personaj bondeziroj, kiujn vi afable direktis al mi lastnumere por la bona kunlaboro kun KCE en Svislando. Regula kaj pli kaj pli altnivela eldonado de la periodaĵoj, i.a. de la nova "Fokuso", estu la pruvo, ke viaj bondeziroj fruktodonas. Kun sincera respekto kaj kun salutoj

D-ro T. Tyblewski"

HORIZONTO estas aŭde legata en la landoj kun totalismaj reĝimoj. Per kontribuo al *Fondaĵo Ivo Lapenna* vi povas abonigi amik/in/on en kiu ajn el tiuj landoj, kaj la administracio prizorgos, ke ĝi atingu lin/ŝin.

AMKANTOJ

CEJANOJ

*Vidu, cejanoj!
Mia koro apartenas al vi
Kiel la cejanoj la grenon.
Ĉion, kion vi nur volas,
Mi faros, kuŝante en viaj brakoj.*

*Vi, celo de miaj deziroj,
Estas balsamo por miaj okuloj.
Vidi vin, estas mia okullumo.
Mi eknestas kontraŭ vi
Por pli bone vidi vian amon,
Edzo de mia koro.*

*Kiel bela, kiel bela estas ĉi tiu horo.
Ĉu povus ... kun mi en viaj brakoj ...
Daŭri ĝis en la eterneco.
Vi vekis en mia koro la vivon.*

*Kaj ĉu ĝi ĝojkrias aŭ funebras,
Neniam iru for de mi, neniam.*

LA AMO VENKOS

*La amo de mia amatino estas sur la tiea bordo;
La rivero estas inter ŝi kaj mi.
Krokodilo staras sur la sablo-benke
Sed mi malsupreniros en la akvon;
Mi antaŭenplonĝos en la riveron.
Kuraĝe mia koro kuŝas sur la ondoj;
La akvo estas kiel tero sub miaj piedoj.
Estas ŝia amo, kiu tiel fortigas min,
Kiu ekzorcas ĉiujn danĝerojn de la rivero.*

Tradukis Els Kervers van Tholen

Du poemoj el la tempo de Amenhotep, la kvara ('Chnaton) Faraono de Egiptio de 1375-1358 a.K., el la 18-a dinastio.

ĈU ESPERANTO KAJ LA GEPATRA?

Vinko Ošlak

/Redakcia noto: La artikolo de Vinko Ošlak, bazita sur la dulingva realaĵo en Karintio, regiono de Aŭstrio, enhavas interesajn ĝeneraligojn kaj pensigajn novajn ideojn pri dulingvismo. Ĉi estas des pli aktuala, ĉar la Jubilea Esperanto-Konferenco en 1987 okazos en Aŭstrio. En la fina parto de sia artikolo la aŭtoro plurfoje uzas la terminon "interna ideo" en senco iom diferenca de tiu donita de Zamenhof. Escepte, ĉefe pro la vastigita senco, ni lasis ĝin neŝanĝita, kvankam pro kaŭzoj multfoje eksplikitaj "interna ideo" estas neadekvata kaj por la samo ni preferas la science ĝustan esprimon "solidariga rolo" aŭ "solidariga funkcio" de lingvo, aŭ, en nia okazo, ankaŭ "idearo ligita al Esperanto", "humaneca internaciismo" ks., depende de la kunteksto. Ideoj ĉiam estas "internaj": ili formiĝas en cerboj, ne en lingvoj, sed ili esprimiĝas ekstere per la lingvo. I.L./

Iom stranga demando. Ja la fenomeno de internacia lingvo baziĝas sur la principo de dulingvismo. Ĉiu lernu deve nur du lingvojn: la gepatran kaj la internacian. La aliaj lingvoj estu lernataj nur laŭ la propraj kaj liberaj intereso, elekto kaj gusto.

Sed ĉi tie, en ĉarma kaj supraĵe kvazaŭ senproblema Karintio oftas la slogano pri dulingvismo de sufiĉe alispeca tipo. Temas pri proklamo lanĉita de slovenoj en Karintio, skribita ĝenerale nur germanlingve, dediĉita formale al la tuta karintia loĝantaro, tamen dediĉita speciale al la germane parolanta popolgrupo. Germane tekstas la alvoko: "*Zweisprachig ist besser!*" (= dulingve estas pli bone) - kaj la tekston ilustras dutiga ruĝa dianto kun signifa malsama grandeco de la floroj. La pli granda reprezentas la majoritaton kun germana gepatra lingvo, la pli malgranda la slovenan minoritaton.

Antaŭ ol daŭrigi la temon mi diru nur kelkajn vortojn pri la problemo: kiel nomi la popolon en Karintio kaj ankaŭ en Aŭstrio, parolantan germanlingve. Nek en la germana, nek en la slovena lingvo ekzistas ebleco per unusola vorto esprimi trafe la esencon tiukoncerne. Mi proponas solvon, por kiu taŭgas nur Esperanto. Aŭstrianoj estas ĉiuj ŝtatanoj de respubliko Aŭstrio - do ankaŭ slovenoj, kroatoj, ĉeĥoj, slovakoj, hungaroj, judoj kaj ciganoj en la lando. Aŭstroj estas nur tiuj loĝantoj de Aŭstrio, kiuj parolas la germanan lingvon kun specife aŭstra maniero kaj vortaro, kaj kiuj sin sentas aparta nacio, kvankam parolanta la germanan lingvon. De nun mi konstante uzos tiujn du terminojn.

Dulingveco en Korintio

La baza ideo de dulingvismo, proponita en la dulingva teritorio de Karintio, kuŝas en tio, ke ĉiu en la lando lernu kaj scipovu ambaŭ landajn lingvojn - kaj okaze de renkontiĝo interetna, ĉiu parolu la propran - kaj senprobleme komprenu la najbaran lingvon.

Unuavide preskaŭ idilia solvo. Kvazaŭ iu nova efektivigo de la pentekosta miraklo: ĉiuj parolas en propraj lingvoj - kaj ĉiuj ilin komprenas propralingve...

Kaj nun post multaj jaroj da senesperantista paco - jen la invado de homoj, kiuj anstataŭ tia pentekosta dulingvismo proponas iun trian lingvon, ĉi tie preskaŭ nekonatan eĉ laŭ nure informa grado. Ĉu eble ne temas pri iu trompcela provo de la aŭstra flanko pere de internacia lingvo subŝovi la problemon pri egalraĵo

de la slovena en la dulingva teritorio de la lando? Ĉu eble ne temas pri simile trompcela provo de slovenoj: relativigi la plifortan rolon de la germana en la karintia socio kaj oficialaj instancoj?

Sed pravas nek tiaj suspektoj, nek la specife karintia dulingvismo, proponita de bonvolaj slovenoj kaj nur teorie akceptita de bonvolaj aŭstroj.

Oni povas konstati, ke nur en okazo de du sufiĉe parencaj lingvoj, kiel ekzemple la slovena kaj la ĉeĥa, aŭ serbkroata kaj kroatserba, aŭ bulgara kaj makedona, oni povas praktiki la interparolon tiamaniere, ke ĉiu uzas nur la propran lingvon - kaj ambaŭ kontentige komprenas la parolon de alia. En ĉiuj ceteraj okazoj la parolantoj de du malsamaj lingvoj uzas nur la idiomon de unulingvulo. Kaj la lukson de unulingveco, aŭ eĉ de plurlingveco, en kiu la najbara, sed minoritata, lingvo ne inkluziviĝas, povas regali al si ĉiam nur la pli potenca el ambaŭ, la reganta, la majoritata. Kaj ĉi tie estiĝas interesa socia kaj psikolingvistika fenomeno. En normalaj cirkonstancoj validas la scipovo de plia aŭ plura(j) lingvo(j) kiel avantaĝo, kaj unulingveco kiel pli primitiva stato de malklereco. Sed en la cirkonstancoj de du- aŭ pluretna kunvivo kun ne plene juste solvita interetna problemo, kun malegala forto kaj socia rajto, fariĝas la malo. Unulingveco fariĝas socia simbolo por la pliforto kaj plivaloro, kaj du- aŭ plurlingveco indikas la subvaloron, diskriminitan staton, dependecon. Nur en tia medio oni povas mire rimarki, ke iu fieras sciante nur la propran lingvon, kaj alia hontas pro la scio de ambaŭ landaj lingvoj. Por tion tuj pruvi sufiĉas eksperimente aĉetiri al la foiroj de sudkarintiaj urboj.

Tiamaniere ĉiu provas je plej favora prezo vendi propran sakon: la majoritatano sian ŝajnan memsufiĉon; la minoritatano sian altruditan dulingvecon.

Falsitaj Varoj

Ambaŭ varoj, vendcele prezentitaj en tiuj sakoj, ŝajnas almenaŭ iagrade falsitaj.

La memsufiĉeco de nombre kaj socie pli forta flanko ŝajnas esti firma nur unudirekte, nur rilate al sia malpli forta kaj dependa najbaro. Kiel ĉe ĉiuj fenomenoj de misa potenco, ankaŭ ĉi tie praktikiĝas la t.n. bicikla metodo: suben premi - supren riverenci. Oni nur pritraktu la senkritikeman adoradon de la angla kaj alprenon de multegaj anglismoj en propran lingvon.

Sed ankaŭ la varo, kiun proponas la minoritata flanko, nome konsekvenca dulingvismo, ne estas tiel valora, kiel ĝi unuavide promesas. Nome: oni povas konsideri la lernadon de najbara aŭ iu ajn alia lingvo morale ekzempla kaj valora, se ĝi estas libere elektita, se de ĝi ne dependas la viveblo aŭ ŝanco de la koncerna dulingvulo. Tia unuopulo, do, el pure moraleca, bonvolema kaj justeca motivoj afable ekpenas akiri la lingvon de sia samlandano. Sed en stato de tia decidebleco ja ĉiam estas nur la ano de la majoritato. En Karintio, do, la aŭstro. Se aŭstro ĉi tie afable eklernas la slovenan, tion oni ja povas saluti kiel fenomenon de malegoisma animvasteco kaj bonkoreco. Bedaŭrinde la afero ne estas sama ĉe la minoritatano, Preskaŭ senescepte la anoj de malplimulto simple estas *devigitaj* scipovi la lingvon de sia pli forta samlandano. Kaj tio, kio estas produktita de socia devigo, nepre ne povas esti sur la socia merkato proponita ankaŭ kiel morale bonvola decido.

Tion oni ja povas kompari kun du aliaj fenomenoj. Perforte forkondukita virino en la landoj, kie ne kutimas libera amo kaj geedza elekto, eble povas dum iom da tempo aserti, ke ŝi fakte kaj eĉ spontanee amas sian viron. Eĉ ŝi mem povas tion kredi. Tamen tio restas afero de asertado kaj blinda kredo. Pruviĝus tia "amo" nur, se la virino povus libere kaj sen maloportunaj sekvoj foriri kaj mem elekti. Same en la politiko. Ĝis nun ne vivis diktatoro, kiu firme ne asertus, ke lia potenco estas plene identa kun la spontanea politika volo de la popolo. Eĉ povas okazi, ke la vastaj popoltavoloj post sufiĉa tempo da subpremado vere komencas mem kredi, ke tiamaniere efektiviĝas ilia propra volo kaj elekto. Tio estas ja iom pli oportuna kaj sendanĝera ol grandriske ribeli. Tamen la vera

Donacoj por la Jubilea Esperanto-Monumento

Stato de la 15-a de aprilo 1986 72.746,70 dkr.

Pliaj donacoj:

Ŝtataŭt. revizoro Finn Bentzen, Danio	2.000,00 "
S-ro Johann Stöcklmair, Aŭstrio	517,70 "
Prof. S. Nisbet, Britio	607,50 "
Inĝ. Nada Sidorov, Kanado, Prof. L. Elvin, Britio, Prof. D-ro F. Pennacchietti, Italio, anonimo, Danio, S-ro R. Moerbeek (Rotterdam), Nederlando	788,00 "
S-ro N. Liventhal, Danio	550,00 "
S-ro L. Persson, Svedio	500,00 "

Stato la 1-an de junio 1986 77.709,90 dkr.

Ne forgesu tuj aliĝi al la JUBILEA KONFERENCO en Graz, 1987, dum kiu estos inaŭgurita la Esperanto-Monumento "LA ESPERO".

Korespondadreso: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio. Pĉk.1257.845

Pensoj pri Dulingvismo *Daŭrigo*

spontanea politika volo de iu ajn popolo fariĝas evidenta sole kaj nur sub la kondiĉoj de regulaj liberaj elektoj inter la diverskoloraj eblecoj kaj kandidatoj, de libera asociiĝa povo, de libera opiniesprimiĝo kaj publika kritiko sen rezervo kaj potenculaj minacoj.

Rezulte ankaŭ la ŝajne tiel bonmodela dulingvismo en la interetna najbareco ekhavis sian moralan valoron nur en la okazo, ke ĝi rezultus ne el nepra neceso, dependa stato, socia devigo, sed el pura simpatio al la aliparolanta samlandano, el lingva aŭ kultura intereso, aŭ simple el kurioza scivolemo kaj lingvohobio.

En tia stato de libera kaj pure morala, respektive propreinteresa elektopovo troviĝas ĝis hodiaŭ nur la germane parolanta aŭstra samlandano. Ekzistas kelkaj brilaj ekzemploj, ĉe kiuj tia sinteno realiĝis. Mi menciuj nur tri belegajn ekzemplojn: ja ege pli multaj fakte ne troviĝas.

(*Daŭrigota en n-ro 5/86*)

REFOJA PETO AL LA KUNLABORANTOJ

Bonvolu *tajpi* viajn artikolojn kaj aliajn kontribuojn kun *interspaco* kaj *larĝa marĝeno*. Manskribitaj tekstoj, eĉ se enhave bonaj kaj interesaj, ne povos esti konsiderataj por presigo.

Se vi deziras, ke la redakcio konfirmu la ricevon de via manuskripto aŭ resendu ĝin en okazo de nepublikigo, bv. aldoni tiom da internaciaj poŝtaj respondkuponoj, kiom necese por eksterlanda afranko.

Se vi *nepre devas enkonduki neologismon*, bv. klarigi ĝian signifon en piednoto.

La redakcio rezervas la rajton mallongigi la tekstojn kaj korekti la lingvon konforme al la Fundamento de Esperanto kaj la decidoj aŭ rekomendoj de la Akademio de Esperanto. Vi multe helpas al la redakcio, se vi mem relegos kaj korektos vian propran tekston, aŭ petos bonan scianton de Esperanto fari tion, antaŭ ol sendi ĝin al la redakcio.

Anticipan dankon pro la observado de nia peto en la estonteco.

Tra la Esperanto-Gazetaro

Redaktas JEAN THIERRY

5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

- VENEZUELA STELO (12/85) - La fundamenta celo disvastigi Esperanton ne plu sufiĉas al multaj ĉiam emaj okupiĝi pri aliaj problemoj: tio estas ilia rajto, sed la danĝero estas miksi la problemojn. Jen en ĉefartikolo Alfredo Portillo ŝajne lanĉas tiucelan kampanjon: "Ĉis (kiam) Esperanto disvastiĝos tra la mondo kaj la naciaj esperantistaj komun(um)oj estos sufiĉi fortaj por povi influi sur la gvidadon de la mondo, ĉu Esperanto restos neŭtrala? Problemoj kiel polucio, armilvetkurado, malriĉeco kaj aliaj, ne ĉesos. Kiel Esperanto povas neŭtrale agadi, se la polucio ĉiufoje pli malpurigas, se la armilvetkurado ĉiutage minacas nin kaj se la malriĉeco malsatigas en tiom da landoj? La Esperantistoj devus pripensi tiun aferon. Esperanto ne estas floro por kultivi en ĝardenetoj: ĝi estas antaŭ ĉio armilo, armilo por batali kontraŭ la milito kaj por venkigi la pacon!" La esperantistoj devus precipe atenti, ke ili ne estu manipolataj: la sola garantio kuŝas en la estigo de fakasocioj por la celoj, kiuj ne rekte koncernas la Lingvon Internacian.

- der esperantist (n-ro 134 - 6/1985) - La komunistaj landaj asocioj malpermesas kongresi en Israelo! Tipa premagado sur TEJO-n kaj UEA-n fare de la tiel nomataj "popoldemokratiaj respublikoj! "... Dum la 18-a Konsultiĝo de 1o Esperanto-organizaĵoj de socialismaj landoj oni esprimis fortan maltrankviliĝon pro tiu kongresplano. La prezidantoj (resp. vicprezidantoj) de Bulgara Esperanto-Asocio, Esperanto-Asocio en Kulturligo de G.D.R., Hungara Esperanto-Asocio, Kuba Esperanto-Asocio kaj Slovaka Esperanto-Asocio en plena zorgo pro la reputacio de TEJO kaj UEA skribis leteron al la prezidantoj de tiuj asocioj. Ĉis fino de oktobro 1985 la menciitoj ne ricevis respondon. Malgraŭ diversaj interparoloj venis neniun respondo. Tio estas nekomprenebla sinteno de la Estraroj de TEJO kaj UEA al siaj aliĝintaj asocioj, kiuj ja meritas respondon al tiom gravaj leteroj ... (Pisanica, 19.4.1985). Sekvas publikigo de la letero: "Estimataj s-roj Maertens kaj Jackson! Ni, la subskribintaj landaj asocioj, diskutinte pri la decido de TEJO okazigi la Internacian Junularan Kongreson en Israelo, esprimas nian plenan malkontenton pri la nesufiĉe pripensita elekto de la kongresa lando. Ni volas esprimi nian fortan konvinkon, ke la okazigo de tiu kongreso en tiu lando forte malutilos al la reputacio de UEA kaj ĝia Junulara Sekcio, TEJO. Ni volas motivigi nian sintenon per jenaj argumentoj: 1. En multaj landoj la homoj konsideras Israelon militanta ŝtato en la araba regiono, kiu aparte persekutas palestinan popolon kaj vivas en malpaco kun siaj najbaraj landoj. 2. UEA jam unufoje devis sperti, kiom danĝere estas okazigi Esperanto-kongreson en Israelo, en la jaro 1967, kiam Israelo atakis arabajn landojn. La danĝero de eksplodo de milito en tiu regiono daŭre estas aktuala. Pro la supraj faktoj niaj landaj asocioj, respektive junularaj sekcioj, ne sendos siajn gejunulojn al Israelo. Ni petas Vin rekonsideri la decidon de TEJO por ne malfaciligi la ĝisnunan bonan kunlaboron. Plenestime. Ĥr. Gorov, prezidanto (Bulgara Esperanto-Asocio), d-ro J. Jermař, prezidanto (Ĉeĥa Esperanto-Asocio), H. Heinel, prezidanto (Esperanto-Asocio en KL de GDR), d-ro I. Pethes, vicprezidanto (Hungara Esperanto-Asocio), A. Pinera, vicprezidanto (Kuba Esperanto-Asocio), M. Zvara, vicprezidanto (Slovaka Esperanto-Asocio)". Tia informo levas plurajn demandojn: ĉu la publikigo de tia premo montras, ke la Estraro de TEJO kaj eĉ tiu de UEA ne plu observas la linion antaŭe regantan en la Komitato de UEA kaj TEJO kiel ŝtato en ŝtato! Ĉiukaze ĉiu povos demandi sin, ĉu tolerebla estas tia malpermeso libere kongresi kaj ĉu UEA estas kapabla rezisti al la premo des pli, ke la Estraroj ankoraŭ ne respondis en fino de oktobro 1985 (kio signifas nek jes, nek ne).

- LA PACAKTIVULO (informilo por komitatanoj kaj aktivuloj de MEM, n-ro 139/1985) - Rimarkinde estas, ke ĝi estas redaktata en TOURS (Francio) de

William Gilbert kaj presata en Bulgario. Ĉefartikolo de Paolo Cerretini, prezidanto de l'Kolektivo Esperantista Komunista (KEK), komparas la rilatojn de MEM kun SAT kaj kun UEA: "La interkonsento subskribita de MEM kaj SAT 2/12/81 ĝis nun ne konkretiĝis. Se kelkaj SAT-anoj individue kunlaboras kun MEM aŭ eĉ ludas gravan rolon en nia movado, ni devas konstati, ke la estraro de SAT facile cedas al antikomunismo kaj rifuzas partopreni en pacmanifestacioj. Tipa ekzemplo estas la silento de SAT kaj SAT-Amikaro je nia alvoko partopreni en la pacmanifestacioj en Parizo, organizitaj de la 'Appel des Cent' (Alvoko de la Cent) kaj tute senpolitikaj. (!!!). La rilatoj kun UEA male estas bonaj. (Jam de Hamburgo 1974 kiu dubus pri tio?) ... En 1984 MEM estis akceptita kiel "kunlaboranta neŭtrala faka asocio de UEA." Tio estas granda kaj signifa decido, kiu spegulas la prestiĝon de nia movado sur la internacia areno."

- INTERNACIISTO (Aŭstrio - 9/10 1985 kaj 3/4 1986) - Denove furoras atakoj kaj foje eĉ per nedelikataj vortoj! "... K-do Metodi Garev atentigis pri la rolo de KEK kaj 'Internaciisto' en batalo kontraŭ antisovetismo precipe lanĉita de SAT en 'Sennaciulo' ... Ernst Diedrich, same malnova IPE-ano (Legu en "Esperanto en Perspektivo" p. 650 pri la "Tragedio de IPE", Internacio de Proleta Esperantistaro 1932), tre indignis en letero al ISTO kontraŭ la artikolo aperinta en 'MONATO', skribante: Jen kuŝas la fifama 'eseo' de Lafera en "Monato" 'Kial oni falsadas historion?'. Mi jam skribis al araba esperantisto, kiu fuĝis el Irako pro Esperanto. Tiu de Lafera disĵetadas fekaĵon kontraŭ Socialismujon, kraĉas en la vizaĝojn de balatintaj mortintoj. Fi! Nun jam estas tri, kiuj en Esperantujo malamege bojaĉas kaj lupe hurlas: SAT, Franca LEA, Monato (rim. de red. 'Horizonto' de Ivo Lapenna). Tio estas la rezulto de neŭtralismo kaj pluralismo kaj de felpantofla 'diplomateco'. Ne mire, ke niaj ŝtatorganoj nervoziĝas. S-ro de Lafera estas blinda je la dekstra okulo. Teatrece li demandas je la fino de sia artikolo en 'Monato': 'Sed kiel solvi la judan problemon?' Helpu al li! Li jam ploras. La medikamento estas tre simpla: 'FORIGU VIAN CIONISMON KAJ ELIRU EL ĈIUJ OKUPITAJ ARABAJ TERIOTATOJ LAŬ LA UNO-REZOLUCIO 202!'. La tono pli kaj pli altiĝas laŭ tute ne demokrateca sinteno! Eĉ k-do André Martin de Namur (Belgio) sendis jenan ultimatan leteron, kiun represis la bulteno: "Ĉu al 'Senrespondeculo'? Rilate la liberan tribunon en S-ulo, kompreneble: 'pri la enhavo la redakcio ne respondecas'. Rilate la artikolojn ĝenerale: 'pri la enhavo (...) respondecas la aŭtoroj mem'. Ĉar iuj nur per kaŝnomoj povas subskribi - eĉ tiu 'demokrata-kontraŭrasisma kaj kontraŭimperiisma maldekstrula' Pinoŝeta 'AMIKO'! (S-ulo 7/85). Tiel eblas io ajn. Ĉu nur respondecus tiam la abonantoj mem, kiuj financas tian faŝisteman kaj apartigeman E-propagandilon? Tre sincere mi ĉiaokaze ŝatas konvinkan klarigon de P.K. (Plenumkomitato de SAT), prefere antaŭ la fino de l'nuna abonkoto. Kamaradece via André MARTIN, SAT-ano 33.027 kaj okulfrape stalinisma komplotisto-kun-la-KGB-tranĉilo-inter-la-dentoj." Tiel!!!! Cetere la bulteno akriĝas la krizon: "Precipe niaj rilatoj kun SAT tre malboniĝis pro ĝia bruska kaj cinika antikomunismo kun antisovetismo. Nia 'Internaciisto' dum jaroj kritikis tiun sintenon - sed sen ia ajn sukceso. Ni tre bedaŭras tiun ĉi fatalan sintenon, kiu ĉiam ripetiĝas de jaro al jaro. Tiuj ideologiaj kapricoj de Ivo Lapenna kaj SAT-ideologoj bremsas la progreson de nia lingvo. Ĉiu el ili pledas por solena centjariĝo de Esperanto, sed premiso por ĝia sukceso estas forigi la makulojn de agresiva antisovetismo. erano."

- SENNACIULO (n-ro 970 & 971 - marto/aprilo 1986) - Okaze de diskuttemo pri SAT kaj religio Jakelino Lépeix enkondukas tre interesan debaton: "Malgraŭ, ke mi ekŝiĝis el ĝi, la katolika eklezio ne anatemis min. Ĉar mi ne havas PIV submane, mi ne scias, ĉu la sintenon de kelkaj ateistaj SAT-anoj mi povas nomi "anatemo", sed estas fakto, ke pro siaj dogmoj ili rifuzas al mi esprimraĵon. Mi aliĝis al SAT akceptante la riskon, ke SAT-anoj konvinkus min pri la erareco de mia kristaneco. Mi pensas, ke kristano, kiu ne pretas akcepti tiun riskon, havas malfirman kristanan konvinkon. Mi scias, ke estas konforme al la statuto de SAT, ke oni kritiku ĈIAJN dogmojn. Ĉu pri tio konscias ĉiuj SAT-anoj??"

Aliflanke la aprila numero estas titolita: Post invito por '87 POLA ESPERANTO-ASOCIO diris ne! Laboristaj esperantistoj ne povos kongresi en la lando de Zamenhof. Kien 1987? La 27-an de julio 1983 la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio skribis: "PEA deziras digne soleni la Centjariĝon de Esperanto kaj ni afable informas (la Plenum-Komitato de SAT), ke ni pretas akcepti la Kongreson de SAT en la Jubilea Jaro." Kaj jen de la 24-a de januaro 1986 per letero ricevita la 24-an de februaro la invito estis nuligita! "Estimataj, respondante vian leteron de la 17-a de oktobro 1985 la gvidantaro de Pola Esperanto-Asocio kun bedaŭro informas, ke nian provizoran inviton organizi vian Kongreson en Pollando en la 1987 jaro ni ne plu subtenas. Ni esperas, ke vi trovos alian organizonton de via Kongreso dum la Jubilea Jaro". Oni ja komprenas la proteston de la Plenum-Komitato: "Estus senutile, ke ni inundu la oficialajn instancojn de Polio (registaron, ambasadorojn, konsulojn, ktp.) per protestletoj aŭ peticioj. Ja, tio ne efikus, ĉar ŝajnas, ke SAT estas tie 'SOCIETAS NON GRATA'." Sed ĉe tia diskriminacio, kies fonto povas esti nur politika, oni ja ankaŭ pli komprenus, ke UEA ŝanĝu tiam sian decidon kongresi en Pollando por antaŭgardi sian neŭtralecon!

- MONATO - 1/86 - Tre interesa partopreno de legantoj pri diversaj temoj: - (respondo) al la komentario (tiel partieca) de R. Schnell pri la Moskva Festivalo fare de Bernhard Pabst - Antropocentrismo, de Yamasaki Seikō - Kia paco, kia libero? de Feiko Munniksma - Kvazaŭ defendo de Unesko por pli bone prezenti sovetiismon subskribita de Gottfried Hofstätter - Rekta atako kontraŭ tradicia ideo de libereco de W. Gunther, kiu verŝajne ne spertis aŭ ignoras, kion signifis la manko de libereco dum la lasta mondmilito ... - du artikoloj de Lafera, unu titolita: *Sub la sankta signo de l'Espero*; la alia por anonci, ke li rezignas pri la pseŭdonomo: "... Mi informas, ke sub la pseŭdonomo LAFERA kaŝiĝas sube subskribita persono, kiu volas, ke neniam lia pseŭdonomo estu elprofitata por akuzi aliajn. Pro la okazintaĵoj en PEA mi estas devigita ankaŭ peti okcidente politikan azilon. Walter Zelazny."

- SAT-Amikaro (n-ro 412 - feb. 1986 - bulteno de la franca landa asocio de SAT) - Kelkaj amaraj pripensoj ŝajne koncernas kelkajn membrojn de UEA: "Same kiel pri la devizo de la Franca Respubliko 'Libereco, Egaleco, Frateco' la koncepto pri la Homaj Rajtoj estas nobla, kiam ĝi ne estas uzata nur por memplezurigo aŭ kiel fasada ornamaĵo. Ĝi principe inkludas respekton al la libereco de asociiĝo. Sekve ĝi ne kongruas kun propriĝema mensostato de estraranoj de monopoligema Esperanto-unuiĝo, pri kiuj atentigis respondeculoj de diversaj Esperantaj institucioj kaj organizoj. Paroli pri la Homaj Rajtoj kaj inside provi samtempe akiri influon aŭ povon super aliaj organizoj per kaŝpenetrado kaj samspecaj jezuitaj metodoj, tio estas stranga maniero apliki tiun koncepton. Kiu agas laŭ tiuj principoj, tiu fermas la vojon al kunlaborado; tiu reprezentas nur sin mem kaj ne devas paroli en la nomo de la tuta Esperantistaro en Francio."

- 71-a UNIVERSALA KONGRESO - 2-a UK-bulteno p. 19. - La Estraro de UEA post konsiliĝo kun LKK havas la rajton rifuzi la partoprenon en la Universala Kongreso de kiu ajn persono, sen la devo doni al la aliĝinto motivaĵon por tio. Kiel komentas LA GAZETO n-ro 4, "Ni vetos, ke denove kelkaj homoj parolos pri 'sovetiismo' en ĉi tiu estimata asocio, kiu sin diras 'universala', sed ne volas ekspliki al ni kiel kongreso povas esti 'universala', se oni rajtas rifuzi la partoprenon al Esperantistoj." Ni aldonu, ke la afero estas des pli grava, ke la rifuzo okazos sen la devo doni al la aliĝinto motivaĵon! Kio ĉiam signis diktatorecon!

JT

Horizonto jam ludas slan tre pozitivan rolon en la Esperanto-Movado. Por ke ĝia voĉo eĉ pli vaste, diskonigu ĝin, disvastigu niajn komunajn ideojn, havigu almenaŭ unu plian abonanton, helpu nin helpi al Esperanto.

DEMISIO DE LA LKK

POR LA JUBILEA KONGRESO DE UEA EN VARSOVIO

Ni ĵus sciiĝis, ke la tuta Loka Kongresa Komitato de la 72-a UK de UEA en Varsovio malfondis sin mem la 31-an de januaro 1986, ĉar ĝiaj laboroj "estis stopitaj" de la komisaroj nomumitaj de la partiaj-ŝtataj instancoj. Tio, laŭ la deklaro de la LKK, "ekzakte kontraŭas la postulojn de la jubilea kongreso, de la respekto al homoj, Esperantaj valoroj kaj idealoj". ĈU VERE UEA INSULTE KURAĈOS "JUBILEI" EN VARSOVIO? ĈU FINE LA DEMOKRATA PARTO DE LA MEMBRARO DE UEA MALFERMOS SIAJN OKULOJN?

JUBILEAJ PRESAĴOJ 1987

La jubileaj eldonaĵoj de ICNEM per siaj simbolo kaj teksto donas la ĝustan mesaĝon pri la Internacia Lingvo (Esperanto). Utiligu ilin vaste por kontribui al la Jubilea Jaro per ĝusta informo kaj por helpi al plua disvastigo de Esperanto en ĝustaj medioj. Prezo: 4 afiŝoj 60 dkr., 10 poŝtkartoj 25 dkr., folio de 8 luksaj glumarkoj 6 dkr. Mendu la necesajn kvantojn ĉe la administracio de ICNEM, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Kopenhago, Danio. Poŝta ĉekkonto: Kopenhago 1 19 06 01.

LA GAZETO

6-SEMAJNA
KLERIGA PERIODAĴO DE M.F.K.A. =
18x24 PAĜOJ = 22 EĴUOJ =

NIA UNIVERSITATO = NIA GIMNAZIO =
NIA LERNEJO = INSTRUADO LAUSISTEMA
DE LA ESPERANTO-KULTURO =

LA PLEJ VERAJ MOVAĴAJ NOVAĴOJ =

NEPRAS AL ĈIUJ SINCERAJ
ESPERANTISTOJ.

ABONU PER SIMPLA LETERO ĈE:
LA GAZETO 39 RUE JOSEPH HENOT
57070 METZ — FRANCO
AU ĈE NIAJ PERANTOJ

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

"Kolumnioj Kontraŭ SAT kaj la Kongreso en Polio" estas titolo de oficiala dokumento, en kiu la Plenuma Komitato de Sennacieca Asocio Tutmonda malkovras pliajn sovetsismajn intrigojn malantaŭ la oktobra puĉo en Pola Esperanto-Asocio kaj la malpermeso de la SAT-Kongreso (*Sennaciulo* n-ro 5/86). SAT nun spertas la samon, kion ĝi spertis en la fruaj tridekaj, kiam sovetsistoj-stalinistoj atakadis kaj nomadis ĝin "*oportunisma, kontraŭmarksisma, kontraŭsoveta, etburĝa, eĉ 'socialfaŝisma'*" kaj fondis IPE, kiun post nelonge murdis la sama stalinismo (v. detalojn en ĉap. 2 de *Hamburgo en Retrospektivo*). Kiam, fine, la esperantistaro komencos lerni el la historio?

La 51-a Kongreso de SAT okazos en Sant Cugat des Vallès, Hispanio, de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1986. La bazaj kotizoj estas 5500 pesetoj por SAT-membroj kaj 7500 pesetoj por nemembroj. Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la OKK je la adreso de la sekretario S-ro Giordano Moya, Str. Balmes 38, Terrassa (Barcelona), Hispanio.

En la longa listo de internaciaj renkontiĝoj en 1986, el kiuj tre multaj sensignifaj, publikigita en *Esperanto*, n-ro 3/86, forestas eĉ mencio pri la 12-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Ateno. La kvazaŭe "neŭtrala" UEA jam dum jaroj prisilentas la konferencojn de la neŭtrala kaj sendependa Esperanto-Movado, sed daŭre reklamadas renkontiĝojn kun evidente partipolitika karaktero en la landoj de la Sovetia bloko. Ĉu tio nenion diras al la membroj de UEA?

Surprize, Konciza informo pri "La Espero", la monumento dediĉita al Esperanto, aperis en n-ro 3/86 de *Esperanto*, en la rubriko "Faka". Kiel ĝuste en tiu rubriko, ne estas klare. Tamen, pli bone tie, ol nenie. Kiel kutime, estas prisilentita la fakto, ke la inaŭguro de la monumento okazos dum la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz. Kial? Ĉu UEA timas, ke la Jubilea Esperanto-Konferenco povus iel konkurenci al la planita UK de UEA en 1987, kvankam ĝi okazos la semajnon post la Konferenco?

Lia Reĝa Moŝto Juan Carlos, ŝtatestro de Hispanio, estas la unua (kaj ĝis nun la sola) eminentulo, kiu konsentis fariĝi membro de Internacia Patrona Komitato (IPK) por la Centjara Jubileo de Esperanto, laŭ *Esperanto*, n-ro 3/86, p. 41. Ni atentigas, ke laŭ la broŝuro de UEA "Kiu Faru Kion?", la IPK devis esti formita "ĝis la fino de 1982"! Nun ni troviĝas en 1986! Ni rimarkigas, ke estas ege neoportune publikigi unu solan nomon, precipe tiel elstare eminentan, anstataŭ atendi ĝis almenaŭ dudeko da eminentuloj akceptos. Estus ankaŭ interese scii, ĉu Lia Reĝa Moŝto, unu el la plej kleraj kaj demokrataj monarkoj, estis lojale informita, ke la UK de UEA en la Jubilea Jaro okazos en Varsovio de Jaruzelski, kaj ke ĝin organizos komisaroj nomumitaj de la Ŝtataj-partiaj aŭtoritatoj. Se ne kaj se la Reĝa Kancelario sciigos poste pri la vero, tio povus kaŭzi retiron de la konsento kun tre malagrablaj sekvoj por la Jubilea Jaro kaj entute por Esperanto. La gvidantaro de UEA devas fine kompreni, ke ĝi povas, malfeliĉe, misinforme misgvidadi sian membraron, sed oni ne rajtas misinformi kaj misgvidi reĝojn kaj aliajn eminentulojn sen riski fatalajn sekvojn.

En la renovigita Centra Oficejo de U.E.A. okazis inaŭguro de nova libroservo/ vendejo la 18-an de aprilo 1986. Desur la strato oni nun vidas, krom la libroj en la montrofenestroj, la grandajn stokojn laŭlonge de la muroj. Al oficiala akcepto estis invitita ankaŭ la unua gvidanto de la Centra Oficejo en Rotterdam, F-ino M.H. Vermaas. Ŝi havis kelkajn interesajn konversaciojn, el kiuj montriĝis i.a., kiugrade la nuna gvidantaro fieras pri fasadoj kaj ne tro estimas statuton. Malaperis la verda stelo pentrita super la enirpordoj - neniel truda - kiel ankaŭ la flagstango de kiu iam flirtis la Esperanto-flago dum ĉiu estrarkunsido. Estas rimarkinde kiugrade homoj ŝajne hontas pro tre respektindaj aferoj. Unu el tiaj aferoj estas tiu sola flago en la mondo, ne makulita de sango.

La 70-an Britan Kongreson de Esperanto, okazintan de la 28-a ĝis la 31-a de marto, partoprenis 160 personoj. Aldone al la rutina programo, S-ro Hugo Röhlinger, membro de ICNEM, faris tri interesajn prelegojn kun lumbildoj, kaj D-rino M. Boulton, kunlaborantino de *Horizonto*, kompetente lekciis pri "*La Vortstoko de Esperanto*". La ĉefa prelegsalono portis la nomon Ivo Lapenna.

La Londona Esperanto-Klubo (LEK), unu el la plej malnovaj kaj plej gravaj en la mondo, ĵus publikigis la Jaran Raporton pri siaj agadoj en 1985. La nombro de membroj estis 182. Okazis 49 klubaj kunvenoj kaj la meza ĉeestado estis 41,6. La programoj konsistis el prelegoj (pluraj de eksterlandaj gastoj), debatvesperoj, Kristnaska foiro, forumoj k.a. La presita *Bulteno* de la Klubo regule informas pri la plej gravaj okazaĵoj en la landa kaj monda Esperanto-Movado.

D-ro Walter Lippmann forpasis en Hamburgo la 5-an de aprilo 1986 en la aĝo de 90 jaroj. Laŭ profesio li estis advokato. D-ro Lippmann fariĝis esperantisto en 1908. En 1923 li estis elektita en la tiaman Lingvan Komitaton kaj ties Akademion. En ĉiuj postaj elektoj li ĉiam estis reelektita, tiel ke antaŭ la forpaso li estis laŭaĝe kaj laŭdefore doĵeno de la Akademio de Esperanto, al kiu li fidele servis, precipe inter 1951 kaj 1965 kiel Direktoro de la Gramatika Sekcio. Kondolencon al la edzino, S-ino Barbara Lippmann, kaj la familio.

La Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo (SES) okazis la 1-an de marto 1986. Interalie ĝi elektis S-ron Claude Gacond, la fondinton kaj motoron de la mondfama Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds, kiel prezidanton de SES. Aldone al sia grandega laboro en KCE, S-ro Gacond kun la helpo de sia edzino, S-ino A. Gacond, prizorgas la Esperanto-elsendojn de Svisa Radio Internacia trifoje semajne: lunde, ĵaŭde kaj sabate je la 18.30 laŭ la mezeŭropa tempo. La nova energia prezidanto certe trovos tempon ankaŭ por revivigi SES, kies principoj de demokrateco, neŭtraleco kaj sendependeco devus esprimiĝi en UEA.

Jerusalema Esperanto Centro celante servi al pilgrimoj kaj al esperantistaj turistoj funkcias jam dum du jaroj. Ĝia celo estas evoluigi la pensojn de D-ro Zamenhof kaj eĉ fariĝi Spirita Rifuĝejo por "*esperantistoj de la malnova tipo*". Interese! Almenaŭ estas fakto, ke la nuntempa esperantistaro troviĝas en danĝera krizosituacio. Kiel blindaj ŝafoj (laŭ Zamenhof) la granda plimulto kuras tien kaj reen sekvante same blindajn "gvidantojn", ŝajne rekte en la abismon. Ĉiujn informojn petu ĉe: *Jeremi Gišron*, Esperanto Centro, Strato Jehezkel 41. IL-95 351 Jerusalem, Israelo.

Esperanto Ruena Regiono planas organizi kvar semajnfinojn lingvajn kaj kulturajn en Rouen, Normandio. Dato de la unua aranĝo estas la 29-a kaj 30-a de novembro 1986. Programo: Diversnivelaĵoj kursoj en Esperanto kaj diskutoj pri la internacia komunikado kaj Esperanto. Informojn ĉe: Grupo Esperanto, 43 rue Desseaux, 76100 Rouen, Francio.

Kleriga Konversacia Klubo (KKK) - ĝis 1974 internacie konata kaj tre vigla, sed nun "dormanta" - ŝajne komencas vekigi. En majo 1986 kunvenis kelkaj el la membroj, inter ili *Kopenhaga Horizonto-Grupo*, kiu formiĝis en la hejmo de la tiam prezidanto, S-ino Kirsten Zacho - iama redaktorino de la revuo *Esperanto* - tuj post La Puĉo en 1974. Dum tiu neformala maja kunveno oni decidis kunveni la unuan mardon de ĉiu monato. La unua kunveno okazos la 7-an de oktobro 1986 je la 19,30 h. en *Ungdomscentret* (KUC), ĉambro n-ro 13, Suhmsgade 4, 1125 Kopenhago K., Danio. Informojn donas la gvidanto: Juĝisto Sven Ziegler, Hegnstoften 18, 2630 Tåstrup, Kopenhago, Danio. Ĉiu Esperanto-parolanto estas bonvena!

Redaktas Kopenhaga Horizonto-Grupo
je la adreso de la administracio

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO,
SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA
REDAKCIO AŬ DE ICNEM.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Koresponda adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube)

FONDO KAJ CELOJ

Dum la 6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM).

Unu el la celoj de la Centro estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideojn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala, sendependa Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizaĵoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de la Centro kaj al la Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havas nur limigitan nombron da ordinaraĵoj membroj.

MEMBRECO

ICNEM konsistas el tri kategorioj de ordinaraĵoj membroj, kies respektivaj kotizoj estas: *Aktiva Membro* 50 sv. fr. aŭ 200 dkr. jare; *Apoganto* 1000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam; *Bonfaranto* 2000 sv. fr. aŭ egalvaloro unufoje por ĉiam. Pri aliĝoj kaj pagoj v. sube.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA9 8TF, Middlesex, Britio

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio

Sekretario S-ino MADELEINE DE ZILAH, 39 rue Joseph Hénot,
F-57070 Metz, Francio

Kasisto S-ro PETER ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio
Tel.: (01) 415615 - (01) 876651; pĉk.: Kopenhago 1 19 06 01

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de la Centro ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ aparte abonebla rekte ĉe la administracio aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.

ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bv. havigi ĉe kiu ajn el la funkciuloj. La kasisto akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bv. atenti: Se por la deziranta aliĝi estas pli simple pagi al la prezidanto, unu el la vicprezidantoj, aŭ al la sekretario, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo ordigos tion kun la kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*

Ĉiuj verkitaj en modela Esperanto.

El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata,
la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo
kaj japana traduko de Retoriko.



RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 140 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 7 anglaj pundoj aŭ 98 dkr. (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 7 anglaj pundoj, 98 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 70 dkr. aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplete sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 70 danaj kronoj, aŭ egalvaloro. La plej cenzurita verko en la historio de la Esperanto-Movado, tabua por la timantoj de la vero, rivela por sinceraj esperantistoj, kaŝe cirkulanta kaj avide legata sub totalecaj reĝimoj.

Prezoj ekde la 1-a de januaro 1984. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia "Libroservo de NEM", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio. Kun escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Jean Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe "ELDONEJO PERSPEKTIVO", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en **HORIZONTO**, ili estas la plej trafa respondo al la pseŭdosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN GEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo ...

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio